



**una
amiko**

**INTERNACIA
LERNEJANA
ESPERANTO-
REVUO**

Septembro,
n-ro 90/3 (54), 17a jaro

**ĝangalecaj
strioj –
huf-ŝueĥoj –
zebro aŭ
ĉevalido kun piĵamo?**

Juna amiko, revuo por lernejoj kaj komencantoj. Eldonata de la Hungara Esperanto - Asocio kaj aŭspiciata de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Aperas kvarfoje jare: februare, aprile, septembro kaj novembro.

Redaktoro kaj grafiko: Stefan MacGill.

Adreso de la redakcio: pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Abonprezo en Hungario ĉe HELIR: 40 ft. (por eksterlandano 48 ft.) Internacie ĉe UEA: 8,40 gld.

Anoncoj:

Kvaronpaĝo: 250ft soclande aŭ 25gld aŭ 3 jarabonoj en aliaj okcidentaj valutoj.

Duonpaĝo: 420ft aŭ 42gld. aŭ 5 jarabonoj.

Tuta paĝo: 600ft. aŭ 60 gld. aŭ 7 jarabonoj.

Dum la someraj vojaĝoj de via redaktoro, altiĝis pli la stakoj de leteroj, petoj kaj kontribuajtoj. "Ve, ĉu necesas malfermi, legi, trakti, respondi kaj redakti ĉion?" li demandis sin kaj onin, aldonante: "Ve, estas hunda vivo!" El tiu konstato venis la ideo prepari numeron pri bestoj. Tro laca tuj eklabori, li enŝaltis la televidilon — modestan nigra-blankan antikvaĵon. Evidente la bildkvalito malboniĝis dum la foresto. Estis programo pri ĉevaloj. Sed la arboj kaj kampoj en la fono transformis sin en ondantajn striojn. Por bonigi la flaŭron (vortklarigon vi trovos en 'Klubo de Legantoj') la redaktoro scienc-nivele piedbatis la aparaton en la renoj, sed tio eĉ pli perturbis la bildon. La strioj transiris de la flaŭro al la faŭno (vortklarigon samloke). Tio ne intensiĝis la rigard-plezuron de la redaktoro, sed almenaŭ donis la inspiron por nia kovril-paĝo. Legu sube sur paĝo 4 pri konkurso ligita al tiu kovrilo!

Kiom el vi komprenis la ĵus uzitan esprimon 'hunda vivo'? Kion pri 'hunda matenmanĝo'? Multaj parol-turnoj estas komunaj al pluraj nacioj, sed malmultaj estas plene universalaj. Tion ni esploras sur paĝo 5. Junuloj el multaj landoj verkis pri bestoj; riĉegan numeron ni sukcesis kunmeti; sed se vi verkis pri io alia ol bestoj, vi devos atendi estontajn numerojn por vidi viajn kontribuojn aperi. Ve, ni ricevas pli da eroj ol eblas aperigi.

En la norda

hemisfero vi reiras al la lernejo kaj nun vi volos korespondi. Nia rubriko proponas al vi riĉajn eblecojn: multaj unuopuloj, multaj klasoj volas leterumi — elektu el plej diversaj landoj: Ĉinio, Francio, Hispanio, Ekvadoro, Sovet-unio. Skribu bele kaj diligente!

Sed — diligente kiel sciuroj, formikoj aŭ orikteropoj?

Faŭne salutats,

Stefan MacGill, 31 aŭg.

Nemzetközi eszperantó diáklap. Megjelenik évente négyszer. Ára: 10 ft. 90/3 szám, XVII évfolyam. Felelős szerk.: Schiller Judith. Kiadja a Magyar Eszperantó Szövetség, Szentháromság tér 6, H-1014 Budapest. Felelős kiadó: Princz Os. ár. Készült a MESZ Sokszorosítóban: hearota 90-170 Kiad. eng. szám: III/IFJ/30/1976; ISSN 0230-1318.

Terjeszti a Magyar Posta. Előfizethető bármely hírlapkiébesítő postahivatalnál, a hírlap-kézbesítőknél, a Posta hírlapüzleteiben és Lapellátási Irodánál (HELIR), Budapest, XIII, Lehel u. 10/a, 1900 — közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a HELIR 215-96162 pénzforgalmi jelzőszáma.

Se estus mi...

Se ĝirafo estus mi, tio tre ĝojigus min;
Mi klinus mian, por alrigardi vin!
 Se elefanto estus mi, granda kaj tre forta,
 Rostre mi salutus, longa kaj,!
Se kanguruo estus mi, mi saltus eĉ risorte,
Hop! Hop! Hop! Pli alte, pli. Aktivus mi tre,!
 Se serpento estus mi, mi siblus tra la sablo,
 Hipnote fiksus predon en frosta,!
Se hundo estus mi, mi svingus mian voston,
Dancadus mi en cirkloj, kaj aspergus ĉiun,!
 Se sciuro estus mi, mi rezignus falsajn luksojn,
 Mi laborus pli kaj pli, kolektante multajn,!
Se kuleto estus mi, mi pikus vin agace,
Se batilon prenis vi, tuj fuĝus mi,!
 Se hirundo estus mi, mi flugus dum semajno,
 De land' al land' sorante, rapide pli ol,!
Se zebro estus mi, mi estus riĉa besto,
Venus kroma mono, pro monokroma,!
 Se pavo estus mi, ĉielarke ok-kolora,
 Paradus bunte mi — arĝentvosta,,!

HELPU! Terura evento ĵus okazis en la urba besto-ĝardeno. Du animalaj kriminaloj ĵus kaŝe eniris kaj ŝtelis gravajn valoraĵojn de la bestoj. Ili ŝtelis vortojn el la besto-poemoj kaj ŝlisis ilin ĉiuj kune en unu kaĝo. Kiuj estas ĉi tiuj fiuloj? Neniuj aliaj ol la senkonsciencia sinjoro Anima Lam kaj la senkora edzino Ani Malam.

Sed, rigardu supren! Kio alflugas? Ĉu estas aviadilo? Ĉu estas birdo? Ĉu estas SuperZam? Ne, estas la hiper-savanto, la granda besto-protektanto, he-roo Animal Am!!! (histeria aplaŭdo petata).

Jen via tasko; Animal Am sukcesas kapti kaj forsendi la gefiulojn, malfermi la kaĝon kaj elpreni la mankantajn vortojn, sed li ne certas remeti ilin al la ĝusta loko. Vi helpu lin!

sagace foston oro-kola nuksoj sporte
transporta vesto senkapablo trajno kolon

Stultulo el valo kaj vir-ĉevalo

(Fabelo de la
donaj kozakoj)



Vivis homo en paco, sub arbedo — palaco, kvin ŝafinoj en la valo kaj la sesa — vir-ĉevalo, avo kaj avino, knabo kaj knabino. Venis lupo:

— Homo, vi vivas en paco, ĉe vi sub arbedo — palaco, kvino da ŝafinoj. Fordonu unu ŝafinon. Se vi ne fordonos, mi ĉiujn formanĝos.

La stultulo fordonis unu ŝafinon. Sed poste revenis la lupo kaj per la sama minaco ricevis ĉiujn ŝafojn, unu post unu. Venis ĝi en la sesa fojo:

— Homo, en la valo ĉe vi estas virĉevalo. Fordonu la virĉevalon. Se vi ne fordonos, mi vin ĉiuj formanĝos.

Fordonis la stultulo sian vir-ĉevalon. La lupo demandis ĝin:

— Ĉu vin devoste aŭ dekape manĝi?

— Devoste.

Alkuris la lupo deposte, sed la vir-ĉevalo tiel ĝin batis per la hufo ferita, ke el tiu la spirito — for.

Do, revenis la vir-ĉevalo hejmen. Ili vivas plu en la valo, maĉas panon kun salo. Mi ilin ĵus vizitis, ĉiujn vivantajn vidis. Kaj jen la fino de la fabelo. Al iu ĉerpilon da mielo, al iu ŝtion en poto profunda kaj al iu sakon da mono abunda.

*Elrusigis Eŭgeno Belonenko
Rostov-Don, Sovet-Unio.*

arbedo: malalta arbo, arbusto

hufo: ĉevala piedo

maĉi: per la dentoj manĝi

ŝtio: supo el acida brasiko

KOVRILA KONKURSO! Sur nia kovrilo aperas interesa titolo:

Ĝangalecaj strioj — huf-ŝu-ĉoj — zebro aŭ ĉevalido kun pijamo?

El lingva vidpunkto tiu titolo estas rimarkinda pro interesa kialo. Studu ĝin. Ĉu vi povas malkovri la kialon? Skribu poŝtkarte aŭ letere la solvon ĝis la 15a de decembro, al: Juna amiko, Hungara Esperanto-Asocio, pf. 193, H-1368 Budapeŝt, Hungario.

Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas

Jen unu el la multaj Zamenhofaj proverboj pri bestoj. Kiun mesaĝon ĝi portas? En kiu cirkonstanco oni uzus ĝin? Nomu aliajn pribestajn proverbojn!

Ofte oni komparas homojn al bestoj pro iu trajto, ekz. 'rapida kiel leporo'. Eĉ vaste konata fablo ekzistas laŭ tiu ideo: la konkurso inter leporo kaj testudo. Sed en iuj kulturoj alia versio de la fablo ekzistas: ekz. en Afriko ne leporo, sed hundo kaj testudo (v. JA 90/2!) Ja ne ĉiuj popoloj havas la samajn imagojn kaj komparojn. Sube ni listigas trajtojn kaj bestojn. Parigu ilin laŭ viaj imagoj. Ĉu ĉiuj ŝajnas al vi taŭgaj? Ĉu vi povas proponi pli bonajn?

vulpo	vesperto	pacienca	malsata
lupo	muso	forta	kvieta
kato	apro	ruĝa	muta
mulo	leono	malpura	okupata
ŝafo	abelo	glita	sovaĝa
virbovo	strigo	blinda	obstina
porko	salikoko	saĝa	memor-lerta
angilo	fiŝo	scivolema	kuraĝa

Eblas manĝi kiel ĉevalo (ege) aŭ kiel porko (aĉe). Se io neniam okazos, ruso diros 'kiam porko kun flavaj botoj grimpas en pomarbon', angloj 'kiam infero frostiĝos', hungaroj 'kiam ruĝa neĝo falas'.

Lerte solvante du problemojn per unu faro, hungaroj kaj nederlandanoj (verŝajne do germanoj) estas relative humanaj, ili 'Batas du muŝojn per unu klapo'; rusoj 'Trafas du leporojn per unu pafo' sed angloj estas plej sadismaj, ili 'Mortigas du birdojn per unu ŝtono'. Zamenhof pli inde 'Trafas du celojn per unu ŝtono' kaj tiel kompatas la birdojn.

Se nerveze iras ruso: 'kiel bovino sur glacio', anglo 'kiel kato sur varmaj brikoj' aŭ 'kato sur varma lada tegmento'. Tio estas la titolo de fama usona teatraĵo, nun prezentata ankaŭ en Esperanto.

Por ruso 'ursa helpo' estas senutila pro la nedelikateco de tiu besto. Se urso staris sur ies orelo, ruso komprenas, ke tiu havas neniun muzikan talenton. Por anglo, necesas diri, ke li havas ŝtofajn orelojn, por hungaro, 'baston-orela'.

Por fini, jen klarigoj kaj kelklingvaj proverboj (A = angla, H = hungara, R = rusa, Z = Zamenhofa). Parigu ilin!

esti nerveza antaŭ prezentaĵo	havi formikojn en la pantalono/esti formaĝverma (A/H)
konduiti tempeste	lasi la katon el la sakon/ leporo el arbuston (A/H)
havi neniun efikon	ne kalkulu kokidojn ĝis elkovo (A)
verŝajne neniam aperonta	havi abelon en la kufo/ klapon en la kapo (A/Z)
senti sin en fremda medio	havi papiliojn stomake/ la koro iris monten (A/R)
obscediĝi je fiksa ideo	hunda vespermanĝo (H)
nerveze moviĝemi	kiel bovo/elefanto en porcelan-butiko (A/H)
esti en miksitaj malordo	kiel akvo de sur la dorso de anaso (A)
doni al neaprezanto	kiel hunda matenmanĝo. (A)
ne antaŭtempe ĝoju	ĵeti perlojn antaŭ porkoj./ Ne nutru lupon, ĝi ĉiuokaze rigardos en arbaron. (A + Z/R)

Blaki kaj Reĝinaldo

Vivis iam en Anglio ĉevalo, kies nomo estis Reĝinaldo. Ĝi estis ĉevalo de lakto-vendisto. Ĉiumatene, liverante lakton, ĝi kutime renkontis sian amikon Blaki, malgranda nigra hundo.

Reĝinaldo ne plu volis esti ĉevalo de la lakto-vendisto. Li volis esti kur-ĉevalo kaj gajni la faman ĉeval-konkurson Darbi. Kaj Blaki, kiu havis sufiĉe mallongajn piedojn, volis scipovi kuri tre rapide, kiel biglo. Unu tagon, ili estis sidantaj en la ĉevalejo de Reĝinaldo. Subite Blaki diris, ke al li en la kapon venis ideo:

"Kial ni ne manĝu karbon?" li diris: "Trajnoj manĝas karbon kaj kuras tre rapide." Ili pensis pri tio dum longa tempo kaj fine Reĝinaldo diris: "Do, ni provu."

Ili malsupreniris en la kelon kaj ĝuste volis preni malmulte da karbo, kiam sinjorino Maria, la dommastrino, aperis.

"Kion?! Vi estas ŝtelantaj mian karbon!" ŝi kriis. Ŝi levis pecon da karbo kaj ĵetis ĝin al ili. La amikoj forkuris. Ili neniam antaŭe kuris tiom rapide. Sed ĝuste tiam la urbestro estis rigardanta tra sia fenestro kaj vidis ilin.

"Ho, tiu ĉevalo povas kuri tre rapide. Mi estas certa, ke li povos gajni la konkurson Darbi. Kaj rigardu tiun hundon, tiu estas vera Biglo. Mi donos medalojn al ili ambaŭ." Kaj li agis tiel.

*Sendis: P. Savolainen
Makhachkala, Sovet-unio.*

Parigu la vortojn kun la klarigoj!

liveri:	nigra brulaĵo
kelo:	mediti
biglo:	normale
Darbi:	altigi
karbo:	subtera ejo
trajno:	honorinsigno
ŝteli:	peli tra la aero
medalo:	rapidkura hundo
kutime:	kapabli
levi:	amas-ti ansportilo
ĵeti:	alporti kvante
pensi:	preni kontraŭleĝe
scipovi:	fama ĉeval-konkurso apud Londono.



NEKUTIMA FABELO:

Antaŭ longa tempo, kiam eĉ via praavino ankoraŭ ne konatiĝis kun via pravo, en iu fora lando vivis reĝo kun belega filino. Ili estis tre feliĉaj, ili multe amis unu la alian. Kiam la filino iĝis dekok-jara, la patro decidis aranĝi balon por ŝi. Venis multaj gastoj, reĝoj, kavaliroj, la plej elstaraj viroj kaj virinoj de la ĉirkaŭaj landoj. Ili vigle festis kun dancado, manĝado kaj amuzado. Kiam la horloĝo batis noktomezon, subite malfermiĝis la fenestroj pro fortega vento. La kandeloj tuj estingiĝis. Kiam oni sukcesis denove lumigi, neniu trovis la reĝinon. Vane oni serĉis ŝin en ĉiuj ĉambroj de la kastelo, vane oni vokis ŝin senĉese, ŝi ne respondis.

Tre malĝojiĝis la reĝo. Li dissendis ĉiujn siajn soldatojn kaj servistojn por trovi la reĝinon. Ili trarigardis la tutan landon, sed ŝi ne reaperis. Finfine, la reĝo proklamis konkurson: li donos la duonon de siaj posedaĵoj kaj la edziĝrajton pri la reĝinido al tiu, kiu retrovos ŝin. Venis multaj reĝidoj, princoj, kavaliroj pro la alvoko. Ili longe serĉadis ŝin, sed vane. Ŝi malaperis kvazaŭ la tero englutis ŝin.

Vivis en fora vilaĝo juna ŝafisto. Ankaŭ li ekaŭdis pri la malaperinta reĝinido. "Eĉ se mi devos marŝi dum mia tuta vivo, mi ne rezignos ĝis mi trovos la reĝinon" li decidis. Li petis de la panjo kukon por la vojaĝo kaj ekiris la venontan matenon.

Li marŝis, marŝadis tra la montoj, tra valoj, kaj fine alvenis en grandan, densigan arbaron. Jam fariĝis vespero kaj li estis tre laca. Li ne sciis, kie tranokti. Fine, li ekvidis lumon. Alproksimiĝante li trovis tie malgrandan kabanon. Li frapis sur la pordo kaj post la permesa vorto li eniris. Maljuna virino sidis apud la kameno.

La brava ŝafisto

VORTKLARIGOJ

kavaliro: surĉevala soldato
kandelo: pra-lumigilo
vane: senrezulte
engluti: preni tra la gorĝon
rezigni: malpersisti
reciproke: al vi ankaŭ (dudirekte)
drako: fajro-sputa monstro
pinto: supro, plej alta parto
stalo: ĉevalejo
neracia: ne laŭ la logiko
galopi: iri rapide, grandpaŝe
rajti: havi permeson

"Bonan vesperon, onjo mia!" li salutis ŝin.
"Reciproke, mia filo," ŝi respondis: "Vi havas bonŝancon, ke vi diris 'onjo mia', ĉar alie mi koleriĝus pro la ĝeno kaj sendus vin for. Kial vi venas ĉi tien, kie eĉ birdo ne traflugas?"

La junulo rakontis al ŝi, kial li ekiris.

"Mi scias, kie estas via reĝinido," diris la virino: "la drako forrabis ŝin kaj nun ĝi kaŝas ŝin en sia palaco.

"Kie mi trovos ĝin?"

”Vi neniam atingos ĝin, se vi iros piede. Li vivas ĉe la fino de la mondo, sur la pinto de la vitra monto. Sed, se vi servos min dum unu jaro, poste mi donos al vi ĉevalon, per kiu vi povos pli rapide iri.”

Kiam finiĝis la jaro, la maljunulino diris: ”Nun vi rajtas iri al la stalo kaj preni unu el la ĉevaloj. Atentu, kiun vi elektas, ĉar nur unu el ili povos porti vin ĝis via celo.”

La junulo eniris la stalon. Estis tie tri ĉevaloj: du grandaj kaj fortaj kaj unu malgranda, maldikega, apenaŭ vivanta. Tiu lasta iris al li kaj metis la kapon sur lian ŝultron, kvazaŭ ĝi dirus: ’Elektu min’. Tuŝis la koron de la junulo tiu ĉi konduto de la kompatinda ĉevaleto. Kvankam li sciis, ke tio estas neracia solvo, tamen li ĝin elkondukis el la stalo. Kiam li surĉevaliĝis, la ĉevalo tremis kaj fariĝis unu el la plej belaj, kiuj entute ekzistas en la mondo. Ĝi ekgalopis per ĉiam pli kaj pli grandaj saltoj. Fine ĝi leviĝis en la aeron kaj pluiris super la nuboj. Post momento ili alvenis al belega kastelo. La junulo frapis sur la pordo. Tuj aperis la reĝidino. Ŝi estis vigla, bonhumora kaj eĉ pli bela ol antaŭ la malapero.

”Vi ne komprenas la situacion, kara nekonatulo” ridetis la reĝidino: ”La drako estas mia edzo. Li estis soleca kaj neamata, eĉ malamata de ĉiuj, kiam mi ekkonis lin. Ne miru, ke ankaŭ li povis doni nur malbonon. Mi donis al li amon kaj li metis antaŭ miajn piedojn sian animon kaj ĉiujn siajn valorojn. Post tio mi ne rajtis kaj ne volis foriri de ĉi tie.”

Kompreninte la vortojn de la reĝidino, la junulo adiaŭis ŝin dezirante ĉion bonan kaj regalopis hejmen. Li rakontis ĉion al la reĝo, kiu, kvankam restis iom malgaja ne plu vidi la filinon, tamen kontentiĝis eksciante, ke ŝi fartas bone, eĉ estas feliĉa. La duonon de siaj valorajoj li donis al la kapabla, bonkora ŝafisto. La junulo vokis sian malnovan amantinon, kiun li forlasis antaŭ iom pli ol unu jaro, kaj ili feliĉe vivis en la kastelo dum la tuta vivo.

M. Alko, Hungario

Bulgara Esperantisto monata organo de BEA

- varia kaj intereskapta enhavo, riĉe ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj;
- aktualaj artikoloj kaj informoj pri la bulgara kaj tutmonda E-movado.
- legindaĵoj en la rubrikoj: Originala verkaro, Esperantologio kaj interlingvistiko, Lingvaj demandoj, Juna Esperantisto, Verdaj Steletoj (por infanoj), Leteroj de korespondamikoj, Deziras korespondi, Distra paĝo k.a.
- legantoj en pli ol 51 landoj
- jarabono: 32 ned. gld. aŭ egalvaloro
- abonebla ĉe la Libroservo de UEA, la hungara poŝto kaj ĉe perantoj en multaj landoj
- petu provexempleron ĉe la redakcio: BE, Hristo Botev 97, BG-1303 Sofia, Buglario.


La kverelo de la kato kaj la hundo

La kato kaj la hundo estis du bonaj amikoj, kaj ili vivis kune en la sama domo kiel fratoj. Unu tagon ili iris al la vendejo, aĉetis poton da butero kaj ili metis salon sur la buteron kaj fermis ĝin per pura kaj blanka tuko. Ili iris poste al la kampo por planti ignamojn, sed en la kampo la kato diris al la hundo: "Kara amiko, mi tute forgesis ion. Mia kuzo invitis min al sia domo por esti la atestanto de la bapto de siaj filoj." "Ho, ne gravas, kara amiko, mi laboros por ni ambaŭ." respondis la hundo.

La kato iris al la domo kaj prenis la poton da butero, retiris la tukon kaj manĝis la duonon.

Vespere la hundo revenis al la domo kaj konstatis, ke oni manĝis la duonon de la butero. Post kelkaj horoj la kato alvenis kaj sen tro atendi la hundo demandis al sia amiko: "Kara amiko, kiu manĝis la duonon de la butero?" kaj por ironii la kato diris: "Eble la filoj de mia kuzo kaj mi! Sed ni manĝis kaj laŝis ion!" La hundo komprenis, ke la kato ne estas ĝentila kaj do ili batalis kaj la kato vundis la hundon kaj jen, kial hundoj kaj katoj estas ofte malamikoj.

*N'cho Attaba Didier, 6a klaso (15 jara)
el "La kuriero d'Amangoua"
Eburborda Esperanto-Asocio,
B.P. 147, Abijan 09.*




Mito kaj realo


Oni diras, ke hundoj ne ŝatas katojn,
Oni diras, ke kverelemaj homoj vivas 'kiel hundo kaj kato'

Kaj tamen okazas,
ke vivas alie mia hundino
kun mia kato:

Ili kune ŝatas petoli
Kaj laŭ sia maniero interparoli,
Kune ludi pilketon
Aŭ la kato gratas agrable la hundineton,
Dormas ili konkorde proksime unu al la alia, —
Matene la kato vekas la hundineton
Dirante kore: "Bonan matenon amikineto,
ĉu vi bonfartas?"



Anna Bajtlik, Skierniewice, Pollando.



Bukedo da infanoj de la lernejo en Amangoua (Eburbordo) kaj floroj apud la lernejo. Tiu grupo aperigas Esperantan kurieron, kiujn la infanoj mem verkas kaj ilustras. Ni aperigas unu rakonton el ĝi. Dekstre oni povas vidi s-ron Kouablan, la Esperanta vigliganto.

Bestaj protestoj

Ne ĉio estas trankvila en la besta mondo. Tion atestas la sekvaj leteroj, kiuj aperis unu post la alia en ilia renomata ĵurnalo *La Besta Bulteno*:

Respektata redaktora moŝto,

Mi deziras plendi, ke Esperanto estas maljusta kontraŭ orikteropoj. En la angla vortaro, kaj en pluraj aliaj, nia nomo — aardvark — estas la unua el la bestoj; ĝi aperas tuj sur la unua paĝo, sed en la Esperanta vortaro nia nomo troviĝas nur post la mezo. Por reĝustigi la aferon, mi proponas neologismon, jen: aa-orikteropo,

Sincere via,



La Ĉefa aa-orikteropo

Sed post unu semajno en la sama ĵurnalo aperis la sekva reago:

Estimata redaktoro,

Lastatempe vi eldonis leteraĉon de plendema orikteropo. Permesu al mi informi vin, ke orikteropo estas fi-besto, kiu kruele formanĝas kompatindajn, senhelpajn, laboremajn instektojn, kaj kies nomo eĉ ne meritas troviĝi en Esperanta vortaro. La nuna laŭalfabeta ordo de nia vortaro estas bonega. La saĝa d-ro Zamenhof metis abelojn en la vortaron antaŭ aliaj bestoj, ĉar abeloj sendube estas la plej belaj, karaj kaj utilaj el la bestoj,

Sincere via, Abela reĝino

Raportis Steĉjo Newell, Kanado.

SOVAĜAJ INFANOJ BESTOĜARDENE

Laboru en paroj! Unu malfermu la gazeton je la paĝoj 12 kaj 13 kaj rigardu la mirindan bildon de Pavel Rak. La alia malfermu la libron je ĉi tiu paĝo kaj elektu demandojn (sed ne nepre en la donita ordo). Unu testo konsistu el dek demandoj. Vidu, kiom rapide la aliaj povas ĝuste respondi. Aŭ: vidu kiom da demandoj ili povas ĝuste respondi ene de unu minuto.

Kion faras Adelo Alten kaj Bazelo Braka? Kion faras Cecilo Cerva? Kion faras Ĉarloto Ĉarnira? Ĉu ŝi estas kontenta? Kion faras Donald Dorsa? Kiel faras Eduardo Elefanto? Por kio li servas? Kion faras Frederiko Falonta? Ĉu li ĝojas? Ĉu li ĝojos post sekundo? Kion oni faris al Ĝefro Ĝirafo? Ĉu li kontentas? Kiel aspektas Georgo, la Gorilo Glutinta? Kion rimarkas Haroldo Havinta? Kion faras Iano Iranta? Kien li iras? Kial? Kion faras Jolanta Jelpanta? Kial? Kio estos ĵus okazinta al Ĵako Ĵusa post unu sekundo? Kiel li nun aspektas? Kiel li aspektos tiam? Kion faras Katrina Katino? Kion ĝi planas fari? Kion faras Leonardo Leono? Kion faras Marcelo Minaca? Kion faras Olivero Obeema? Kial? Kiun li obeas?

Kion faras Normano nudigisto? Per kio? Por kiu? Kio okazas al Paulo portato? Kiel li sentas kaj kion li faras? Kion faras Roberto Revenigisto? Ĉu li sukcesos? Se ne, kio okazos al li? Kiel oni uzas Sergo Serponton? Kion ĝi opinias pri tio? Kion ĝi verŝajne faros post momento? Kion faras Tereza Trikananto? Por kio tio servos? Por kiu ĝi estas, laŭ vi? Kion faros Umberto Uzurpisto? Kion provas fari Viktoro Vulturo? Ĉu li venkos? Kion faras Zorbo Zoisto kaj Ĥristo Ĥaoskonstatinto? Kion ili faros pri la infanoj kaj la bestoj?

Kiu infano estas la plej malfeliĉa? Kiu estas la plej feliĉa? Kiu la plej produktiva? Kiu la plej sportema? Kiu tondas? Kiu glitas? Kiu grimpas? Kiu saltas? Kiu puŝas? Kiu timas? Kiu malsekiĝos? Kiu besto malpeziĝas? Kiu malbone kondutas? Kiuj prenas venĝon? Kiun beston vi plej ŝatas el ĉiuj en la bildo? Kial? Kiun infanon en la bildo vi volus esti? Kial?

HEROLDO DE ESPERANTO


La plej ofta sendependa internacia gazeto de la movado Heroldo de Esperanto en la nuna jaro festas sian 70an datrevenon. Ĝi estis fondita en 1920 en Kolonjo de Teo Jung kaj aperadis ĝis nun kun nur du esceptoj: en 1936 pro naziaj persekutoj, sed ĝi baldaŭ poste reaperis en Nederlando; la dua pli longa silento okazis dum la milita periodo inter 1940 kaj 1946. Sub la redaktado de Ada Fighiera Sikorska, ĝi aperis dum 17 jaroj el Bruselo, dum 9 jaroj en Madrido kaj nun el Torino. La ĉefaj karakterizoj de ĉi tiu populara gazeto estas:

- ĝia granda formato kaj la vario de ĝia enpaĝigo
- ĝia ofteco (16 numeroj jare)
- la abundo de informoj, sinteze verkita laŭ rubrikoj pri junularo, kongresoj, feriaj renkontiĝoj, libro-recenzoj, jubileoj, mallongaj informoj, Nia Filmo, anoncetoj ktp.
- la specialaj numeroj pri la Universalaj Kongresoj kaj la kalendaro de Esperantaj kunvenoj



Animalaj
olimpikoj!

Kiu besto plej
rapidas? Jen iliaj
rekordoj en
kilometroj hore.



virginia strigo 64

trumpeta cigno 80

libelo 88

hirundo 352



reĝa anaso 64

pelegrina falko 281

reĝa aglo 193

fregato 420

Kiuj bestoj estas pli rapidaj ol vi? Kiuj malpli? Kiu fiŝo plej rapidas? Kiu tera besto? Kiu birdo? Kiu plej malrapidas?

Faru demandojn unu al la alia.



ĉevalo kun rajdisto 69

kanguruo 80

antilopo 98

leporhundo 66

gepardo 101

vulpo 64

leporo 72

tinuso 70

velfiŝo 109

glavofiŝo 96

8

ANIMALAJ OLIMPIKOJ


La bronzan medalon prenas la rano, 70-oble la propran longecon. Sekvas kanguruoj kaj homoj.

ALTOSALTO:

La ora medalo iras al la eta pulo, kiu kapablas salti 130oble sian propran altecon! Se homo havus tiun kapablon, li aŭ ŝi povus salti super 65-etaĝa konstruaĵo!

Argenta medalo iras al la flugfiŝo pro mirindaj salto, kiuj atingas altecon el la akvo 24-oble sian longecon.

Bronzan medalon prenas la kanguruo, kiu kapablas salti unu metron pli ol la propra alteco. En kvaraj kaj kvinaj lokoj estas ĉevaloj kaj homo.



LONGOSALTO:

La oran medalon gajnas la flugfiŝo — ĉu ĝi saltas, ĉu ĝi flugas — ĉiuokaze, 2000-oble sian propran longecon!

La argentan medalon meritas la pulo, per salto 250-oble la propran longecon. Se elefanto havus tian kapablon, ĝi sukcesus salti trans la Danubon kaj super la parlamenton (kie almenaŭ fortirus nian atenton de la deprimidaj eventoj tie diskutataj).


MARATONO:

Ene de 24 horoj homo sukcesis kuri 248 kilometrojn, kaj alia homo marŝi 167 kilometrojn. Sed ili ne kapablas konkurenci kun la medalistoj. Bronzo al la hirundo, kiu restas fluganta dum naŭ monatoj el ĉiu jaro. Argento al la fregato (mara hirundo), kiu flugas senhalte dum kvar jaroj serĉante sian nestolokon! Oro al tri fiŝoj: la tinuso, la blanka ŝarko kaj la glavofiŝo, kiuj naĝas senhalte dum la tuta vivo; se ili haltus iliaj koroj ĉesus funkcii. Ili ĝenerale vivas tridek jarojn!

PROFUNDO:

Homoj sukcesis sen ekipaĵoj plongi en la maron ĝis profundeco de cent metroj. Pingvenoj sukcesas ĝis 260 metroj. Bronzo al la rosmaro, ĝis 600 metroj. Argento al baleno, kiu atingas 3000 m. serĉante la gigantan kalamaron, kontraŭ kiu ĝi batalas. Finfine la homo gajnas oran medalon pro subiro en batiskafo ĝis preskaŭ 11 kilometroj!

(fonto: L'Orsa, Milano)



Fondo de Vilnius

Antaŭlonge, antaŭ tre longe, kiam litovoj ankoraŭ havis reĝojn kaj dukojn, la duko de Litovio estis Gediminas. Li estis tre brava, havis multe da soldatoj, multe da ĉiaj riĉaĵoj. Kiu nur atakis nian Patrujon, volante forrabi pecon da tero, ĉu germano, ĉu ruso, ĉu polo, tiun Gediminas tuj venkis. Tial ĉiuj malamikoj jam de malproksime timis lin. Tiam litovoj ankoraŭ ne estis kristanoj.

Iam, la duko kun siaj servistoj kaj diversaj sinjoroj forrajdis por ĉasi. La sinjoroj rajdis sur belaj ĉevaloj, iliaj seloj estis broditaj per oro kaj arĝento, ĉe flankoj ili havis pendantajn akrajn glavojn, malantaŭ zonoj enŝovitajn pintajn tranĉilojn, en siaj manoj ili havis kornojn. Fusilojn oni tiam tute ne konis, ĉar ili ankoraŭ ne scipovis fari pulvon; kontraŭulojn kaj bestojn ili venkis per glavoj aŭ pafis per sagoj. La servistoj kondukis hundaron.

Tiel ĉiuj rajdis arbaren. Dum la tuta tago ili ĉasis bruante en la arbaro. Kiam venis vespero ĉiuj ĉasintoj, lacaj kaj malsataj, renkontiĝis sur monteto apud la rivero Neris. La servistoj kuntiris ĉiujn mortigitajn bestojn. Kiom da! Estis nek vulpoj, nek leporoj, sed ĉiaj grandegaj: alkoj kun longaj kornoj, lupoj, vilaj ursoj. La duko mem ĉasis la plej grandan eŭropan bizonon. Post la manĝo la duko diris: "Kiom bele estos tranokti ĉi tie. Preparu tuj liton!"

Servistoj kunportintaj ursajn felojn preparis el ili kuŝlokon, kaj ĉiuj ekdormis, lulataj per la muĝado de kverkoj. Matene la duko diris:

"Mirindan sonĝon mi sonĝis ĵus. Ŝajnis al mi, ke sur monto staris granda granda fera lupo. Ĝi tiom terure hurladis, kvazaŭ interne de ĝi estus centoj da pliaj lupoj. Kion povus signifi ĉi tiu sonĝo?"


Neniu povis diveni. Sed la duko nepre volis scii. Proksime al ili, en la arbaro, situis preĝejo de la Peruno. Apud ĝi loĝis la plej grava pastro de antikvaj litovoj *kriviu krivaitis*. Litovoj tre estimis lin. Kion diris li, tion oni opiniis sankta. La duko decidis rajdi al li kaj peti klarigon.

Kriviu Krivaitis aŝkultinte ekmeditis horeton, poste li diris: "Plej hela duko! Via sonĝo signifas jenon: tiu fera lupo estas urbo,

kiun vi devas konstrui sur tiu monto. La urbo estos tiom forta, kiom fero; kvankam niaj kontraŭuloj atakos ĝin, volante ruinigi kaj detruigi ĝin, ili ne sukcesos, ĝi ĉiam staros kaj defendos nian patrujon de malamikoj. Tiuj lupoj, kiuj hurladis interne de la lupoj, ili estas fortaj viroj en tiu urbo. Famo pri ilia mensoj kaj potenco sonos larĝe tra la tuta mondo, kiel la hurlado de tiuj lupoj."

VORTKLARIGOJ

selo: sidilo ĉe ĉevalo
brodi: kudre ornamo
glavo: tranĉa batalilo
sago: fluganta batalilo
vila: haro-hava
felo: haŭto kun hararo
kverko: granda arbo
hurli: krii kiel lupoj
sonĝo: noktaj bildoj



Al Gediminas tre plaĉis tia klarigo de la sonĝo. Li obeis la vortojn de la pastro kaj fondis kastelon sur tiu monto, kie ili tranoktis, kaj nomis la lokon *Vilnius*. Li mem poste transloĝis tien kaj ekde tiam ĉiuj dukoj loĝis tie. La urbo pligrandiĝis, iĝis forta kaj riĉa kaj multe da famaj personoj devenis de ĝi.

Kaj nun, kvankam delonge ne plu estas litovaj dukoj, Vilnius staras kiel ĉiam. En tiu loko, kie staris la preĝejo de Peruno, nun staras la plej bela katedralo kaj sub la altarego eblas vidi altaron, kie antikvaj litovoj bruligis fajron por Peruno. Speciale ĉi tiu loko estas tenata, por ke ĉiu povu vidi, kiel preĝis niaj geprapatroj kaj kiajn preĝejojn ili havis.


Ŝatrijos Ragana
Esperantigis Drasutis Počkevičius

Olda grilo

La lasta olda grilo
En sufoka aŭtuno
Kun nokta muzikilo
Kantas al pala luno.

Ĉirp', ĉirp', estas fakte,
Ĉirp', ĉirp', estas fakte,
Neniu povas eterne vivi,
Ne ĉiu povas feliĉe vivi.

Ĉirp', ĉirp', estas certe,
Ĉirp', ĉirp', estas certe,
La nobla spirito povas eterne vivi,
L'amoplena koro povas feliĉe vivi.



尚大庆

Féng Dá-Qīng
Huangshan Linye Xuexiao
CN-245041, Anhui-Tunxi, Ĉinio

ĉirp': onomatopeo (son-simila vorto) por la sono de insekto, precipe grilo.
eterne: por ĉiam



Gvidas:
Josef Chvosta,
Leninova 16,
CS-29001
Podebrady,
Ĉeĥoslovakio.

Faŭno kaj Flaŭro

Karolo ŝatas korespondi kun siaj eksterlandaj literamikoj pri la faŭno kaj flaŭro tie. Faŭno estas praktike zoologio, tio estas la scienco pri bestoj, kaj flaŭro estas botaniko, tio estas la studo de plantoj, arboj kaj vegetaĵoj. Ambaŭ sciencoj havas multajn branĉojn. Karolo verkis la sekvan konkurson por vi:

1. Kion vi scias pri bestaj kaj plantaj simboloj? Ekzemple urbo aŭ lando havas objekton el la faŭno aŭ flaŭro sur poŝtmarkoj, flagoj kaj blazonoj. Foje la objekto simbolas certan econ, aŭ estas legendo aŭ rakonto ligita al ĝi. Desegnu aŭ priskribu ekzemplojn!

2. Priskribu ĝardenon, parkon aŭ arbaron apud via loĝloko. Ĉu la plantoj kaj bestoj en ĝi bone fartas? Se ne, kiuj estas la kaŭzoj de la problemoj, kaj kion necesas fari por plisaniĝi ilin?

3. Verku dialogon inter infano kaj plenkreskulo en zoologia aŭ botanika ĝardeno.

4. Kiujn bestojn vi havas hejme? Kiujn bestojn vi plej ŝatas? Kial? Ĉu ekzistas bestoj, kiujn vi ne ŝatas? Kial?

5. Kiuj bestoj en la mondo estas en danĝero, ĉar la tuta specio riskas formorti? Kion ni devas fari por savi ilin?

Sendu respondon al unu, kelkaj aŭ ĉiuj demandoj al la supra adreso. Ĉiu ricevos belajn bildkartojn.

SUKCESAJ SOLVINTOJ de la konkurso

'Ĉu ĉio tie apartenas?' el 90/1:

V. Miĝaŝuite, Vilnius, Litovio; Carola Langer, Jüterborg, DDR; d-ro Kaczinski, Havelberg, DDR; Edeltraut Henning, Prenslau, DDR; Ludmila Parad, Kirov, Sovet-unio; Bovana Ivova, Varna, Bulgario; Jarka Nigrinova, Jablonec, Ĉeĥoslovakio; Lukasz Sokol, Ruda Sl., Pollando.

Koran gratulon al ĉiuj!

Deziras korespondi

dez. kor. = deziras korespondi
tutm. = tutmonde
ĉ.t. = ĉiuj temoj
i.a. = interalie
ktp. = kaj tiel plu
ks. = kaj simile
bk. = bildkarto
pm. = poŝtmarkoj

Ni aperigas korespond-petojn de junuloj, klasoj kaj instruistoj senpage. Anoncojn de aliaj plenkreskuloj ni ne aperigas. Bonvolu skribi tre klare (latin-litere) kaj doni sufiĉajn informojn: aĝon, sekson, interesojn. Nelegeblajn petojn ni ne aperigos. Multaj nomoj kaj adresoj verŝajne aperas erare pro neklara skribado! Bonkvalita foto (prefere nigra-blanka) bonvenas.

Britio

John Kennedy, 134 Brent Road, Southall, London, UB2 5LD. 15-jara junulo, pri komputilaj ludoj pri spaco, astronomio. (el la bulteno de la Kastora klubo)

Bulgario

Iqlika Cokova, Lenin 5A-8, BG-6000 Stara Zagora. 17-jarulino, interesiĝas pri lingvoj (germana, hispana, Eo), naturo, turismo kaj literaturo.

Junulara Klubo, Esperanto-domo de kulturo, ul. Gen. Gurko 34, BG-6000 Stara Zagora. 17-18-jaraj klubanoj dez. kor. tutm.

Viktor Penkov, ul. 28 Januar 3, BG-7200 Razgrad. 14-jara dez. kor. kun Francio, Hispanio, Svedio, Usono, Brazilo kaj Italio. Ŝatas lerni lingvojn, kolekti bk.

Ĉeĥoslovakio

Silvia Smutná, Medvedzie 152/35-20; 13-jara; Ljuba Medvecká, Medvezie 140/20-20; 13-jara; Tanja Molnárová, Medvezie 128/5-50; 12-jara; Viera Pajerchinová, Medvedzie ĉ.80; 13-jara. Kvar knabinoj dez. kor. kun

Germanio, Britio, Aŭstrio. Al ĉiu adreso aldonu CS-027 44 Tvrdoŝin.

Ĉinio

Féng Ji-Hai, Huangshan Linye Xuexiao, Tunxi-shi Anhui-sheng, CN-245041. 14-jara knabo, tutm. pri ĉ.t. Interŝanĝos bk., kalendaretojn, pm. kaj monerojn.

Yuan Zhigang, Di Er Zhong Xue, Wannian, Jiangxi, CN-335500. 25-jara instruisto dez. kor. tutm. pri ĉ.t. (EPĈ)

Esperanto-grupo kun membroj 18-ĝis 22-jaraj dez. kor. tutm. pri literaturo, fotado, interŝanĝado. S-ro Xie Lajjun, Jiaohu Di Er Gaoji Zhongxue, Jiaohu, Jilin CN-132500.

Ekvadoro

Rodrigo Braganza, Tarqui y 10 de Agosto, Riobamba. 16-jara junulo.

Eduardo Brito, Carabobo y Veloz 24-34, Riobamba. 16-jara junulo.

(Ambaŭ prenitaj el la bulteno de la Kastora Klubo.)

Francio

11-ĝis 14-jaraj lernantoj dez. kor. tutm. pri ĉ.t.: Esperanto-Klubo C.E.S., F-49490 Noyant.

Deko da skoltoj el centra Francio, inter 15- kaj 18-jaraj dez. korespondi tutmonde. Bv. skribi al la skoltestroj Pascale kaj Samuel Gaillard, 50 Avenue du Livradois, F-63800 Cournon d'Auverne. Ili povas perĉi adresojn de multaj lernejoj, kiuj deziras korespondi Esperante (aĝoj 3 ĝis 12). Sekvas kvar el tiuj adresoj:

8-ĝis 11-jaraj lernantoj. Classe de M. Hornéro, Ecole primaire publique, F-63640 Charensat.

8-ĝis 11-jaraj lernantoj. Classe de Mlle Nenny, Ecole primaire publique, F-63330 Saint Maurice.

Naŭ- kaj dek-jaraj infanoj dez. kor. kun latinamerikanoj. cM1, cM2, Mme. Heaulme, Ecole Pierre Ravel, F-63140 Chatel-Guyon.

Kvar- kaj kvin-jaraj infanoj dez. kor. tutm. kun aliaj infanoj, ne nepre samaĝaj. Mme.

Margarette BRUN, Ecole Charbonnieres les Vieilles, F-63410 Manzat.

FR Germanio

53 novaj lernantoj en la tria klaso dez. kor. tutm.: Heinz-Gerd Diesenhoff, Anna Str. 24, D-4100 Duisburg 14.

Nadine Zilvar, Graubenhagen Str. 8, D-3240 Herzberg. 11-jara knabino serĉas samaĝan leter-amikino. Hobbioj: baletto, biciklado kaj naĝado.

Germana DR

Henriette kaj Cornelius Schwarzenstein, Rhinstr. 2, Whg 7.1, DDR-1136 Berlin. 7- kaj 10-jara gefratoj dez. kor. tutm.

Italio

Giuseppe Battista, Via Roma N 23, I-70010 Capurso-Bari. 12-jara.

Jugoslavio

11-13-jaraj lernantoj dez. kor. tutm.: Esperanto-grupo, Osnovna skola, YU-23272 Novi Becej.

Norvegio

Monbiletojn kaj monerojn el la tuta mondo kolektas 13-jara knabo. Povas pageti aŭ interŝanĝi kontraŭ bk. aŭ simile: Erik Hov, N-2826 Snertingdal.

Peruo

Pedro J. Nunez Diaz, Jiron Eten 285, Cajamarca. Instruisto.

Pollando

15-17-jaraj lernantoj dez. kor. tutm. pri muziko, danco, filmoj, turismo, junularaj problemoj ktp. Wieslaw Stanicki (instruisto), Liceum Ogolnokszt., PL-07-130 Lochow.

Elzbieta Salamon, pl. Nowotki 7/6, PL-57-540 Ladek-Zdraj. Dez. kor., kolektas pm., bk., glubildojn, kalendarojn.

Rumanio

Dez. kor. tutm. pri ĉ.t. Ĉiu 15-jara en R-2400 Sibiu:

Iuliana Aldea, Calea Dumbravii bl. 17, ap.44; Anamaria Bistriceanu, Cv. Vasile Aron, Str. Steflesti bl.9,ap.16; Catalina Dumitrescu, Bd. Victoriei 21; Loredana Gindila, Str. Lutului 54; Cristina Ramona Pop, Str. Tribunei 33; Mihaela Salcudean, Valea Aurie, Str. Crint 5,bl.14,ap.27; Roxana Stoescu, Str. Lenin 6; Nicolae-C. Tarcea, Calea Surii Mici 1; Ramona Todircea, Aleea Usciorului bl.67,ap.11; Felicia Vadas, Aleea Steaza 3, ap.14; Florentina-C Vacar, Str. Rahovei, bl.20,ap.2; Iulia Vidrighin, Str. Avrig 1; Rodica-D Vinersar, Str. Tiglarilor, bl.21,ap.47; Madalina Sibisan, Str. Manejului 4,ap.2 (10-jara); Mircea Dragomir, Str. Vasile Aaron 7 (17-jara) kaj ilia instruisto: Vasile Albu, Str. Eroilor 9. (63-jara em. kemiisto, tel.: 924-43601).

En R-2437 Cisnadie:

Loredana Catana, Str. Piata Noua, bl.F,ap.5; Alina Luca, Str. Stejarului, bl.19,ap.9; Monica Opris, Str. Stejarului, bl.25,ap.29; Daniela-M Talos, Str. Proletarilor 9.

En aliaj urboj:

Monica-L Gurzau, Str. Bailor 4,bl.2,ap.9, R-2459 Ocna-Sibiului. Bianca Tronco, Str. Bailor 2,bl.4,ap.10, R-2459 Ocna-Sibiului. Mihai Boca, Str. Zorilor 26, R-3130 Dumbraveni.

Sovet-Unio: Estonio

Trijn Tambla, Liiva 4-18, SU-202820 Paide; 10-jara knabino kun Svedio, Finnlando, Hungario k.a. pri ĉ.t., bombon-paperoj, glumarkoj.

Janne kaj Kaire Tamm, Suuvi-Aia 20-36, SU-202820 Paide. 10- kaj 12-jaraj knabinoj kun div. landoj pri ĉ.t. Bv. sendi foton.

Multaj lernantoj 11-15-jaraj dez. kor. tutm. pri ĉ.t. Kontakto ilin tra la instruisto, kiu volas interŝanĝi instru-materialon kaj -ideojn (vortludojn, enigmojn ks.): Johannes Palu, Sõlme 21, SU-2000016 Tallinn.



Sovet-Unio: Litovio

Jurgita Sargelyte, Kalny 16, SU-235000 Jonava. 15-jara junulino, ŝatas legi, kolektas bk., glumarkojn kaj kalendaretojn.

Jolita Baliukevičiute, Chemiku 84-25, SU-235000 Jonava. 15-jara lernantino kolektas kalendaretojn, bk. pri bestoj kaj pri religiaj temoj.

Neringa Alisouskaite, Papiles 10-1, SU-235420 Kuršenai. 16-jara pri muziko, bk., pm.

Laima Krivcikiene, a.k. 24, SU-235000 Jonava 1. 34-jara estrino, de infanĝardeno volas ekuzi la eduk-sistemon Montessori, kaj korespondi tiucele.

Renata Banevičiute, Str. Vairo 14-149, SU-232044 Vilnius. 14-jara lernantino dez. kor. tutm. pri ĉ.t., aparte pri muziko.

Jurgita Baltrušaityte, Puŝinio 104-34, SU-234520 Marijampole. 16-jara fraŭlino dez. kor. pri lingvoj, arto, politiko, vojaĝoj, literaturo, folkloro kaj muziko. Kolektas pupojn kaj bk.

Jolanta Mituzaitė, Zemaičių 39-78, SU-235458 Venta (Akmenes raj.). 18-jara fraŭlino dez. kor. tutm. pri ĉ.t. Interesiĝas pri muziko, modo, kino, arto. Kolektas bk. pri hundoj kaj katoj.

Sovet-Unio: Ceteraj

Ize Kikuste, SU-228725 Lizums (Gulbenes raj.) Latvio. 18-jara (vidu la foton) dez. kor. tutm. Interesiĝas pri Hindio kaj lingvoj.

Roman Lazarev, ul. 9 janvarja 26A-6, SU-660049 Krasnojarsk.

Svetlana Joneina, Gagarina 206-80, SU-603137. 15-jarulino kun samaĝuloj pri ĉ.t.

Tanja Kuzmina, Dzerĵinskogo 46A-9, SU-640027 Kurgan. 16-jara pri muziko kaj komputiloj.

Vadim Ĉajkin, p.k. 124, SU-326520 Cjurupinsk 1. Junulo dez. kor. tutm. pri naturismo, nudismo, E-movado, orientaj batalartoj, jogo. Kolektas librojn, E-aĵojn, naturistajn revojn kaj fotojn.

Nataŝa Malkova, Str. Kirova 51, SU-456420 v. Uĵiskoe (Ĉeljabinskaja). 14-jarulino dez. kor. tutm. pri ĉ.t. Interesiĝas pri lingvoj, korespondado; kolektas etiketojn, kalendaretojn, afiŝojn de pop-kantistoj kaj bk.

Grupo de diversaj gelernejanoj dez. kor. tutm. Esperanto-klubo, pk. 3693, SU-344022 Rostov-Don.

Marina Peniloskaja, ul. Nekrasov 6-2, SU-165320 Kizema (Arĥangelskaja obl.). 14-jara pri muziko kaj literaturo.

Larisa Bogomazova, ul. Jurina 246-60, SU-656060 Barnaul 60. 18-jara siberiano dez. kor. tutm. Ŝatas vojaĝi, legi.

Valia Lonjuŝkina, Str. Baburkina 6-1, SU-656064 Barnaul 64. 14-jara lernantino, tutm. pri ĉ.t.

Inna Kravcova, ul. Kominterna 8, SU-396576 Belogorje (Voroneĵ obl.). 15-jarulino dez. kor. Ludas pianon, kolektas bk. kun bestoj, pm. kaj kalendaretojn.

Elvira Ŝiĵanĥa, ul. Kalinina d. 11, SU-313720 Gotvald (Harkovskaja obl.). 14-jara, pri literaturo, historio, lingvoj, dancoj, muziko.



Julia Evtušok, ul. Amikeco de Popoloj 78, kv. 130, SU-665770 Usti-limsk 12. 14-jara komencantino kolektas bk., kalendaretojn. Dez. kor. tutm.

Ditc Aleksandro, ul. Krasnoturinskaja 15-15, Sverdlovskaja obl., SU-624488 Volĉansk. 15-jara junulo. Kolektas bk., monerojn, pm. Interesiĝas pri kernio, radio, fotado, komputiloj, lingvoj kaj ĵudo.

Hispanio

Jen tuta klaso da junaj hispanoj, kiuj deziras korespondi. Al ĉiu adreso, kiu ne havas urbon, necesas aldoni: E-30139 Los Ramos. Unue ni listigas la knabinojn:

Josefa Espada Manuel, C/Angel 22; M. Carmen Salvador Hernandez, C/ Federico Garcia Lorca 1; Raquel Manuel Sanchez, C/Gran Via 19; Aroa kaj Eliza Martin Martinez, C/Rosario 17; Ma. José Miralles Ortuno, Vereda del Chocolate 2; Noelia Tovar Nicolas, C/ El Polvorin 2 (ĉiuj 11-jaraj); Monica Marínez López, C/ Doctor Fleming 3y5; Noelia Miralles Sanchez, C/San Javier km. 10., Ma Remedios Manchado Marin, C/ Trinidad s/n; Amada Carcel Juan, Avda de Murcia 132; Dolores Amaya Tomás Garcia, C/ Las Parras 10 (ĉiuj 12-jaraj); Amelia Sanvchez Jara, C/ Esperanza 21; Ma. José Sanchez Nicolas, C/ Mayor 45 (13-jaraj); Nuria Manuel Canovas, C/ Gran Via 17; Ma Carmen Manuel Sanchez, C/ Gran Via 19; Inmaculada Hernandez Andreu, C/ Serrano 19 (14-jaraj) kaj aliurbe: Anna Belén Abellón Ortiz, C/ Mayor 11, Barrio San Blas, Torreaguera-Murcia (16-jara).

Nun la knaboj, ekde la plej junaj: Pedro E. Carcel Bravo, Rincón de Almodovar; Jesus Liza Moras, C/ Caridad 28; Antonio Jimenez Lorca, C/ Ramón de Campoamor 14 (11-jaraj); Antonio Sanchez Soler, C/ Fco Salzillo 4, El Bojar, E-30570 Beniajan-Murcia; Alejandro Quirante Miralles, C/ Madariaga 11; Enrique Abellan Rodrigues, C/ Avda San Javier 129; Eduardo Rodriguez Ruiz, C/ Victoria 9 (12-jaraj); J. Antonio Salvador Hernandez, C/ Federico Garcia Lorca 1; Sergio Ibanez Aleman, C/ Caridad 17; Gustavo Sanchez Gonzalez, C/ Transformador 6 (13-jaraj); Jesus Hernandez Orenes, Rincón de Almodovar; Sergio Martinez Zamora, C/ Transformador 22; Moises Pujante Melgar, C/ Gran Via 10; David Carrillo Miralles, C/ Avda de Murcia 81 (14-jaraj); Raul Canovas Perez, C/ Caridad 5 (16-jara); J. Vicente Larrosa Garre, C/ Las Zarzas 9, E-30580 Alquerias-Murcia (17-jara); F. José Sanchez Soler, C/ Fco Salzillo 4, El Bojar, E-30570 Beniajan-Murcia (18-jara); Cesar Galvez Navarro, C/ Caridad 30 (30-jara).

Miaj paseretoj



Mi ege ŝatas aŭskulti ĉirp-tonojn
de paseretoj sur mia balkono
ili ja tien ĉiutage venas
kaj preparitan manĝaĵon forprenas
kaj mi tiam kore, tre kore kontentas
ke ilin mia balkon' ege tentas.
La vidindaĵo estas tre impona
sur la surfaco de mia balkono;
la emocion senĉese mi sentas
kaj pri l'evento mi tre sentimentas
ja mi feliĉas pri tio konstante,
ke ili ĝojas ... ĉirpante, saltante.
Romuld Skalinski, Pollando.

Perantoj de Juna Amiko en orienta Eŭropo

Regas malcerto pri la oficialaj peraj eblecoj en ĉi tiu mondparto. Alskribo al deko da perantoj kaj asocioj en junio rezultis en tre malmultaj respondoj. Oficialaj instancoj kelklande akceptis abonojn lokvalute, sed nur en difinita periodo, longe antaŭ la nova jaro. Ni petas legantojn kaj instruistojn en tiuj landoj fari ĉion eblan aboni por 1991 tra oficialaj kanaloj ĝustatempe, se tio ankoraŭ eblas, ĉar tio ŝparas al la redakcio, kaj precipe la redaktoro, multan laboron. Se eblas, bv. informi la redakcion kiun prezon oni postulis. Se jam ne eblas, bv. informi ankaŭ. Tiukaze ni sube proponas movadajn perantojn. Se aperas pluraj prezoj, la unua estas tiu por unuopa jarabono (4 numeroj). La postaj ciferoj estas la po-abona kosto por kolektivaj abonoj por respektive 3 ĝis 7, 8 ĝis 29 kaj ekde 30 ekzempleroj.

La ekonomiaj kondiĉoj en Hungario kaj por HEA draste akriĝis tra la somero. La abono por 1991 altiĝos ĝis 60 forintoj, kio influos ĉiujn orient-eŭropajn kotizojn, kiuj devos kiel eble plej baldaŭ ekkovri la bazajn produktokostojn de la revuo. Okcidentaj abonoj jam tion faras kaj restos sensanĝaj. Pluraj kotizoj indikitaj sube validos nur ĝis la apero de numero 90/4, kie aperos novaj ciferoj, do reabonu frue!

Bulgario: Abonu ĉe la ŝtata perejo REP ĝis novembro. Verŝajne 2,40 levoj. Kiu ne sukcesas, turnu vin al nova peranto Liljana Koleva, Bulev Cvetko Radojnov 10-2, BG-1527 Sofia; pormomente 2,40 levoj.

Ĉeĥoslovakio: Ekde septembro ĉe PNS, dovoz tisku, Dlouhá 12, CS-110 01 Praha 1 por Ĉeĥio (tel. 42 2 2316795, kataloga n-ro 25423). PNS, nám. K. Gottwalda 6, CS-813 81 Bratislava por Slovakio. Movada peranto akceptas abonojn tutjare: SEA, Sobotske nam 6, CS-058 01 Poprad. Krona abonkotizo nekomunikita.

Germana DR: PZV preŝkaŭ certe ne plu peras abonojn (bv. tamen konfirmi tion!) Nova peranto estas Rolf Beau, Jacobstr. 9, O-7010 Leipzig; tel. 295900; konto 5602-39-22320. 5,00; 4,50; 4,00 kaj 3,50 markoj (nur por loĝantoj de orienta Germanio).

Hungario: Ĉe ĉefaj poŝtoficejoj aŭ rekte ĉe HELIR, Lehel u. 10a, H-1900 Budapeŝto, prefere antaŭ la jarfino. Jarabono 60 forintoj. Donacabono por eksterlandanoj 72 ft. Konto HELIR: 215-96162. Kolektivaj kaj malfruaj abonoj ĉe "Juna amiko", p/a HEA, pf. 193, H-1368 Budapeŝto. 70 ft; 60 ft ekde 8 ekz.; 55 ft ekde 16; 50 ft ekde 30.

Jugoslavio: Terezija Kapista, Studentska 39/23, YU-11070 Novi Beograd. Prezoj ĝis nov. 1990: 3 din., 2,8. 2,7. 2,6. Poste minimume 8 dinaroj.

Pollando: Abonado tra RSW ne eblas. Turnu vin al PEA aŭ la ILEI-sekcio, p/a H. Ejsmont, ul. B. Bartoka 1 m 49, PL-92-547 Lodz. 800zl. 750. 700. 600 ĝis nov. Poste multe pli.

Rumanio: Nova peranto: Vasile Albu, Str. Eroilor 9, R-2400 Sibiu. 25, 23, 21 kaj 20 lei.

Sovet-Unio: Turnu vin al Sojuzpeĉatj dum septembro. Mendonumero 25423. Eble 3 rubloj?; se tio ne funkcios ni aranĝos movadajn perantojn; kontaktu vian klubestron aŭ SEU.

El tiuj landoj kaj aliaj sen perantoj ni akceptos pagojn forinte rekte al HEA (80 forintojn) aŭ 5 internaciajn respond-kuponajn.

Du novaj perantoj aliloke

Hispanio: Francisco M. Munoz Garre, Camino del Carcanox s/n, E-30580 Alquerías (Murcia). Prezo anoncota.

Japanio: Rowena MacGill, 1563-2 Okuyama, Inasa-si, Sizuoka-ken, 431-23. 600, 550, 500 kaj 450 enoj. Inkluzivas aeran ekspedon.

Internacia: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando (pĉk. 378964). 8,40gld., 7,50gld., 7,00gld., 6,00guldenoj. Aere ekstereŭrope.

**Plena listo de perantoj kaj pliaj novaĵoj aperos en numero 90/4
Frua kaj amasa reabonado por 1991 precipe en firmvalutaj landoj ege
helpos nin certigi la seninterrompan pluaperigadon de nia revuo!**